

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum kelkaj monatoj ni turnos nian atenton al la vivo, penso kaj verkaro de Hector Hodler, unu el niaj valoraj verkistoj.

A.- Dum la dua Universala Kongreso en Ĝenevo en 1906 Hector Hodler amikiĝis kun Paul Berthelot, la fondinto de la gazeto *Esperanto*, kun Théophile Rousseau, la defendanto de propono favora al la kreado de publikaj esperanto-oficejoj, kaj kun Alphonse Carles, la iniciatinto de la esperanto-konsuloj.

Cl.- Kiel nova redaktoro de la gazeto *Esperanto* Hector Hodler ne nur larĝe malfermis siajn kolonojn al Théophile Rousseau kaj Alphonse Carles. Li ankaŭ aktive apogis ilin verkante artikolojn pri la praktika uzo de esperanto.

A.- En front-artikolo titolita **La Tria Kongreso** Hector Hodler refoje esprimas sian esperon, ke la esperantistoj kapablos forlasi la teorion por la praktiko :

Cl.- « *Tro longe*, skribas Hector Hodler, *ni por nia propagando devis kontentigi nin per teoriaj [...] argumentoj ; nun, ni havas ŝatindan kolekton de faktoj, kiuj montras la vivecon de nia entrepreno ; ni sciu ĝin valorigi.* »

A.- Ni citu du aliajn erojn el tiu front-artikolo. Jen ĝia unua paragrafo :

Cl.- « *Kiam aperos tiuj ĉi linioj, la tria kongreso de Esperanto jam estos realaĵo. Tra la Angla Universitata urbo zumados la diverslanda anarego Esperantista ; en multaj ĉambroj laŭtiĝos la sonoj de nia lingvo, bruos la aplaŭdoj, ĝojigos la festoj, dum en la malgrandaj kunvenoj diverslandanoj kunigitaj per la sama celo intime laborados, disrompinte ĉiujn **jarcentajn barilojn.*** »

A.- Hector Hodler pli kaj pli akcentos la gravecon de la malgrandaj kunvenoj, kiuj grupigas specialistojn. Antaŭ la okuloj li havis la profetan bildon de kongresoj, kiuj « *disdividiĝos en centojn da internaciaj specialaj kongresoj kaj festoj [...] per Esperanto.* » Pri la praktika uzo de esperanto, jen kion li skribis, en tiu artikolo, kiu anoncas la trian kongreson :

Cl.- « *La pura propagando jam ne estas la sola celo de nia penado ; al ĝi ni aldonas nun la tujan utiligadon de Esperanto. Ni do deziru, ke, dum la Tria Kongreso, okazu ekster niaj kunvenegoj esence difinitaj por propagando, multaj, multegaj el tiaj specialaj kunvenoj, kiuj estas la kvazaŭa skizo de la venonta homaro esperantistigita.* »

A.- Kaj Hector Hodler post tiuj vortoj proponas veran agad-programon :

Cl.- « *Ni deziru, ke la societoj kiuj estis nur iniciatitaj kaj ekfonditaj en Ĝenevo definitive organiziĝu en Kembriĝo kaj alprenu planon de agado, kiun ili povos efektiviĝi dum la venonta sezono esperantista. Ni deziru ke la delegitoj de la peresperantaj organizaĵoj, kiel konsuloj, Esperanto-Oficoj, kaj aliaj, fortikiĝu per komuna konsiliĝado kaj fariĝu de nun efektive laborantaj kreaĵoj. Jen staras tie ĉi granda tasko, kies realiĝo estos por nia afero la fondo de novaj sukcesoj, tiom pli certaj, ke ili havos praktikan fundamenton.* »

A.- Doni al la esperantismo praktikan fundamenton, jen la granda celado de Hector Hodler. Tiurilate li renkontiĝos en Kembriĝo kun Harold Bolingbroke Mudie, anglo seĝara pli maljuna ol li. Ambaŭ junuloj certe multe diskutis pri la esperanto-situacio, ĉar kelkajn monatojn poste ili anoncos la naskiĝon de Universala Esperanto-Asocio. Harold Bolingbroke Mudie estos la prezidanto kaj Hector Hodler la vicprezidanto de tiu nova societo.

Cl.- Edmond Privat, kiu partoprenis la organizadon de la tria Universala Kongreso kaj post la kongreso restis en Kembriĝo por lerni la anglan lingvon, bone konis Harold Bolingbroke Mudie. Jen kiel li priskribis tiun prezidonton de UEA en radio-prelego, kiun vi povas relegi en la libro *Aventuroj de pioniro* :

A.- « *Bolingbroke Mudie estis la tipa talenta organizanto kaj angla **business-man**. Li havis mirinde praktikan saĝon kaj multan sperton. Pro tio li ŝatis la ideon de Hector Hodler fondi asocion por la tuja kaj efika uzado de la mondlingvo. La monon, kiun gajnis Bolingbroke Mudie ĉe la Borso Londona, li malavare donacis al la movado, kaj li estis pionira gvidanto de la Londona Klubo kaj de la Brita Esperanto-Asocio. Fraŭlo, vivanta kun ĉarma blankhara patrino, li dediĉis la tutan liberan tempon al la afero, kaj lia akcidenta morto, dum la unua mondmilito, perdigis al la movado unu el ĝiaj plej kapablaj organizantoj.* »

Cl.- Unu monaton post la tria kongreso Hector Hodler resumas siajn impresojn pri tiu grava manifestacio.

A.- Kontraŭe al tio, kion ni tro ofte renkontas en niaj gazetoj, Hector Hodler ne nur laŭdas. Li ankaŭ sin permesas kritiki. Kaj liajn kritikojn oni aŭdos. Ili influos la organizadon de la kvara Universala Kongreso, kiu okazos en 1908 en Dresden. Jen por konkludi nian hodiaŭan prelegon eroj el tiu konstruiga kritiko de Hector Hodler :

Cl.- « *Pli kaj pli, niaj kongresoj montras, ke la estonteco de nia afero dependas de la specialistaj societoj, kiuj **uzos** Esperanton por sia propra utilo ; ju pli multiĝados tiaj societoj, ju pli ili fariĝos vivantaj kaj agemaj, des pli la venko de Esperanto estos proksima, ĉar tiam nia lingvo fariĝos vera bezono de siaj uzantoj kaj estos jam enradikigita en la kutimo. Tion ĉi oni neniam tro multe ripetos, ĉar tro multaj estas ankoraŭ ekskluzive priokupitaj de la predikema propagando, kaj ne atentis pri la nova periodo, kiun komencis nia movado.* »

A.- Hector Hodler poste montras, ke niaj kongresoj havas nenian leĝdonan povon, ĉar ili reprezentas ne la esperantistaron, sed simple la personojn, kiuj povas veturi al la kongreso. Li antaŭvidas la tempon, kiam la kongresoj grupigos elektitajn delegitojn. Antaŭ tiu epoko estas vane multigi la ĝeneralajn kunvenojn, kie la kongresanoj perdiĝas « *en senfinaj teoriaj diskutoj* ». Kaj li aldonas :

Cl.- « *La ekzemplo de la Kembriĝa kongreso estas karakteriza : ĉiumatene, la kongresanoj kunvenis kaj, ĉar plej ofte ne ekzistis difinita tagordo, la diskutado disvastiĝis pri ĉiaj temoj kaj rezultis en sencela babilado, iafoje amuza, sed per si mem neutila. Dume, la specialaj kunvenoj, kiuj havas multe da laboro, devis sin kontentigi per unuhora kunsido, tiom pli ke ekskursoj estis organizitaj en la sama tempo.* »

A.- Kaj Hector Hodler esprimas la deziron, ke estontece oni malmultigu la ĝeneralajn kunvenojn kaj multigu la fakajn kunsidojn, kiuj formas tiom da interesaj kongreseroj. Estas en ili, ke oni vere laboras.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-